横浜エスペラント会のエスペラント文会報

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Jokohama Esperanto-Rondo (JER, Hama-Rondo)

# La Jar-kajero de Jokohama Esperanto-Rondo

De aŭtuno 2012 – ĝis aŭtuno 2013

Nia rondo, kun pluraj lernoklasoj, havas preskaŭ ĉiumonate "Hama-Rondan Vesperon" (HRV), en kiu oni aŭskultas prelegon de membroj aŭ gastoj. Ni listigas HRV kaj kelkajn aliajn eventojn.

(Sibayama Zyun'iti, la Redaktanto)

(Noto) La loko markita per [KK] estas nia Kutima Kunvenejo, nome Gubernia Kunven-Centro [Kanagawa Kenmin Sentaa] en Jokohamo.

## (En 2012)

*sept. 1 [KK] Prezento de someraj spertoj

*okt. 20 [KK] Hama-Ronda Vespero: temo: Inicado al la Esperanto-kursoj. Parolis s-ino Doi, s-ro Iwaya, s-ro Koyama, s-ro Sibayama.

*okt. 20, 21 [Parko Zoo-no-Hana] Esperanto ekspoziciata, en Jokohama Aŭtuna Internacia Festo 2012.

*nov. 17 [KK] Hama-Ronda Vespero: temo 1: vojaĝo al Saĥaleno, de s-ro Nanba; temo 2: Kongresa kurier-ad-o kaj 'Sezono de Amo', de s-ino Doi.




*novembro: Eldoniĝis libro "Punkuino", nepalaj legendoj esperantigitaj de s-ro Razen Manandhar, el la eldonejo Montaro ĉe s-ino Doi.

*dec. 15 [en Urbo Odaŭara] la 42-a Zamenhof-Festo de Gubernio Kanagaŭa (de la 4 rondoj, node de Jokohamo, Kaŭasaki, Fuĵisaŭa kaj Odaŭara).




## (En 2013)

*jan. 27 [Tikyuu-Simin Kanagawa Plaza] La jarkunveno de Jokohama Esperanto-Rondo, kun 16 partoprenantoj (kaj 2 mandataj voĉoj). La jara raporto/buĝeto por 2012 aprobita, kaj tiu por 2013 aprobita.

*feb. 10 [ĉambro en la Domo de JICA] Partoprenante en la "Internacia Forumo de Jokohamo" al la urbanoj, s-ino Doi parolis pri "Esperanto en Afriko".

*feb. 16 [KK] Hama-Ronda Vespero: temo 1: la 7a Azia Kongreso, de s-ro Sibayama: temo 2: la 98a Universala Kongreso, de s-ro Doi.

■ Eldonas Doi Hirokaz ■ Redaktas la organa fako de JER: Sibayama Zyun'iti
■ Poŝtadreso: n-ro 85 CPO,Yokohama, Japanio (JP-220-8691) ■ Telekopio: +81-45-785-5458
■ Retadreso: hamarondo@yahoo.co.jp ■ TTT-ejo: http://www.hamarondo.org
■ Abono: jare 1500 enoj, aŭ 10 eŭroj ■ uea-konto: jokr-j (Jokohama Esperanto-Rondo)

*mar. 9 [Havena parko de Jokohamo] Komuna kantado de “Rekviemo”, kanto omaĝe al la forpasintoj de cunamo en la 11a de marto, 2011.



S-ro Makino Micuo kondukas koruson antaŭ Hikawa-maru.

fotita de s-ro Ooba Mituru

*mar. 9, 10 [KK] Foiro de Civitanaj Agadoj: Estis foiro de la grupoj, uzantaj regule la KK-ejon, inkluzive de nia rondo.

*mar. 16 [KK] Hama-Ronda Vespero: Pri la KER-ekzameno prezentis s-ro Sibayama.

*apr. 20 [KK] Hama-Ronda Vespero: Hama-Rondo 45-jaraĝa, de s-ro Doi.

*maj. 18 [KK] Hama-Ronda Vespero: parolo de ges-roj Kleemann el Germanio



ges-roj Kleemann



ges-roj Suzuki Masumi kaj Kunio

*jun. 15 [KK] Hama-Ronda Vespero: parolo de s-ino Suzuki Masumi, vojaĝinta tramonde sur Pacŝipo

*jul. 20 [KK] Hama-Ronda Vespero: parolo de s-ro Henning el Svedio



*sept. 7 [KK] Prezento de someraj spertoj; Parolis ges-roj Sibayama, s-ro Koyama, s-ro Tanigawa, s-ro Suzuki, s-ro Iwaya kaj ges-roj Doi. Kelkaj el la prezentaĵoj aperas en tiu ĉi gazetonumero.

ESEOJ

# Ne atenditaj aferoj en la UK

KOYAMA Takesi

Ankaŭ ĉi-jare mi partoprenis en la UK okazinta en Rejkjaviko. Do mi parolis kelkajn spertojn pri neatenditaj aferoj.

**1. Malfacila mendo al Gronlando-Kulusuk en la UK**

Unue mia ekskursa mendo al Gronlando ne sukcesis, ĉar mia mendo malfruis. En la marto mi havis doloron en dekstra kruro 2-foje, unue pro granda tubero per falo de biciklo kaj poste pro transforma genua artrozo. Do mi hezitis mendi ekskursojn de la UK. Tamen komence de la aprilo mi mendis kelkajn ekskursojn esperante ke krura doloro malaperos antaŭ ol mi ekvojaĝos al Islando.

Mi kelkfoje ricevis retleterojn pri ekskursa mendo al Gronlando de UEA kaj post unu monato mia ekskurso estis solvita bone kvankam ĝi havis ioman ŝanĝon. Do mi vizitis la vilaĝon Kulusuk en Gronlando.



Apr. 23; Mi ne sukcesis mendi ekskurson al Gronlado-Kulusuk. Sed en ĵaŭdo mi povos rezervi lokon en jena kondiĉo. La prezo plialtiĝas je 50 EUR kaj partoprenantoj estas almenaŭ 10. Post cerbumo mi mendis ĝin.

Apr. 29; la ĵaŭda ekskurso nuliĝis pro nur 7 mendintoj. Alia ekskurso al Gronlando estas tre alta prezo; 615 EUR. Mi rezignis ĝin. Mi tuj telefonis al turisma agentejo en Tokio por peti informon pri vojaĝo de Rejkjaviko-Gronlando.

Apr. 30, Mi havos lokon en flugo duonhore pli frue al Kulusuk en merkredo, kvankam mi devos flugi kiel ordinara pasaĝero sen esperanta gvidanto. Tamen en Kulusuk mi vizitos la vilaĝon kun kongresanoj. Mi tuj sendis la retmendon.

Maj. 4, mia mendo estis traktita bone. Mi tre gojis kaj kore dankis al la oficisto de UEA , ĉar mia ekskurso estis solvita sen krompago.

En la UK merkrede mi flugis al Gronlando per alia aviadilo duonhoron plifrue ol la kongresanoj aparte de ĉefa grupo. Tamen en Gronlando kun kongresanoj mi piediris al la vilaĝo Kulusuk. Estis tre bele, mi sufiĉe ĝuis la purajn pejzaĝojn de Gronlando. Supre de la monteto mi rigardis la montojn kun restanta neĝo, la flosglacion inter montoj kaj la dometojn sur deklivo dise en la vilaĝeto. Post la tagmanĝo mi revenis inter flosglacioj sur pale blua akvo proksime al flughaveno per motorboateto. Dank' al bela serena vetero kaj gesamideanoj mi havis ĝojegan ekskurson en Gronlando sen genuodoloro.

**2. Neuzataj vintraj vestaĵoj**

Mi ricevis la veteran informon de malvarma urbo Rejkjaviko kaj mi enpakis vintrajn vestaĵojn anstataŭ someraj vestaĵoj. Sed mi ne multe uzis ilin. Multaj junulinoj surmetis senmanikaĵojn same kiel en Londono.

**3. Saleca akvo de Blua Laguno**

Marde mi ekskursis al Blua Laguno.

Momente kiam mi lasis manon de tabla rando de observejo meze la varmofonto, mi perdis ekvilibron kaj devis trinki akvon. Tio estis mia eraro hontinda. La salecon de la akvo mi ne forgesos longe.



Sur boato en Gronlando

**4. Bonveno de moskitaro**

Lunde mi ekskursis al Ora Cirklo kaj survoje la buso haltis en la ripozejo Fontano ĉe lago. Kiam ni alvenis al la ripozeja domo, flugamaseto kolektiĝis ĉirkŭ ni. Mia amiko nomis ilin moskitoj. Mi sentis la vivfortecon de moskito en malvarma lando Islando.

# En julio, en Londono, kaj en Parizo

**TANIGAWA Hirosi**

Kune kun mia edzino mi vizitis Londonon por 3 noktoj kaj Parizon por 6 noktoj.

En la suburbo de Londono S-ino Kimie Markarian akceptis nin. Ŝi gvidis nin al verdoriĉa grandega parko. Ni ĝuis komfortan promenon en la belega, pitoreska pejzaĝo. Promeni en la pleje angleca kamparo estis certe unu el niaj aspiroj.

Dankegon al S-ino Markarian! Kaj bonan laboron por Esperanto kaj por sorobano!

En Parizo S-ino Kazue Audibert gvidis nin al strat-oj, butikoj, metro-stacioj, ktp.
Dank' al ŝiaj ege praktikaj informoj ni povis sufiĉe libere ĝui parizajn tagojn uzante la metro-liniojn ĉiutage. Ni promenis sur avenuoj, vizitis muzeojn, staris ĉe la historiaj placoj… Estante en Parizo mi forte sentis la imponan historion kaj kulturon de la Urbo. Homoj estis liberaj kaj gajaj. Abundis muzikoj. Abundis ankaŭ polvoj kaj sonoj. En muzeoj mondskale juvelaj artaĵoj estis mirige libere eksponitaj, tiel ke, iuj ajn povus rekte tuŝi la monde valorajn artaĵojn, se oni dezirus. En Japanio tute kontraste! La firma respekto al la homa digno kaj al homa libereco, jen, la esenco de la Franca Revolucio, mi sentis en Parizo. Ŝajnis, ke S-ino Audibert tian Parizon profunde amas kaj intimas. Elkoran dankon al ŝi!



S-ino Kazue Audibert kaj mi, ĉe la Muzeo de Luvro, Parizo

# Budapeŝto - vartejo de Esperanto

**Mizro IWAYA**


Kiam ni esperantistoj legas librojn, ni tuj rimarkas ke multaj libroj, verkistoj, eldonejoj k.a. devenas de Hungario, plejparte de Budapeŝto. Fama ekzemplo estas la gazeto “Literatura Mondo”, kiu aperadis en Budapeŝto ekde oktobro 1922 ĝis aŭgusto 1949, sume 27 jaroj kun iom da interpaŭzo. La torento de eldonaĵoj naskis amason da talentuloj kaj majstraj verkoj. Se oni nomas Bjalistokon kaj Varsovion lulilo de Esperanto, do oni nomas Budapeŝton vartejo de Esperanto.



Mi vizitis tiun interesan urbon en tiu ĉi junio. Mia unua impreso estis ke Budapeŝto estas varma. Junio ne estas somermezo, sed la temperaturo superis 30 gradojn ĉiutage. Kaj mi trovis tre malofte klimatizilon en la urbo: plejmultaj restoracioj ne havas ĝin, nek hoteloj, nek taksioj krom kelkaj altklasaj esceptoj. La rivero Danubo fluas meze de la urbo. Ĝi dividas la urbon en du partojn: Buda kaj Peŝto. Okcidenta Buda situas sur fortika monteto kun Reĝa Palaco. Tie troviĝas statuo de la granda reĝo István. Orienta Peŝto prosperas per komerco kaj industrio. Tiu regiono spertis multfojan detruon post la enradikiĝo de hungaroj/madjaroj en la 9a jarcento, fare de tataroj/mongoloj k.a. eĉ dum la lastatempa “Revolucio”, sed ĉiam rekonstruita kaj nun ĝi montras imponan belecon.

La jaro 1922, kiam Literatura Mondo naskiĝis, estis la jaro de sendependiĝo. Aŭstria Imperio disfalis ĵus antaŭ jaroj. Tiu jaro signis komencon de esperantaj eventoj en Hungario. Ni japanoj rememoras ke la jaro 1906 estis mirinda jaro en Japanio: eldoniĝis unua esperanta lernolibro kaj fondiĝis Japana Esperantista Asocio. Tiu jaro estis ĝuste unu jaron post la fino de japan-rusa milito. Mi vidas ke liberiĝo naskis entuziasmon en ambaŭ landoj.

La Danubo estas la centro de vidindaĵoj. Ĉiuj vidindaĵoj troviĝas ĉirkaŭ la rivero. Okcidenta Buda havas sur la monteto diversajn historiaĵojn: Reĝa Palaco, Preĝejo Matias, Fiŝista Bastiono k.a. Min interesis la restoracio apud Fiŝista Bastiono, kie oni muzikas per violono kaj zimbalono (hungara tradicia muzikilo) ĉiutage. Mi vidas ke hungaroj amas muzikon, ĉar Hungario estas hejmo de danca muziko nomata Ĉardaŝ. Orienta Peŝto havas belan parlamenton ĉe la riverbordo. Ankaŭ preĝejoj, muzeoj kaj granda bazaro ekzistas tie. Sed granda inundo atakis Hungarion ĵun antaŭ mia vizito, kaj mi trovis tie kaj ĉi tie konstruan kaj riparan laboradon, kiu difektis la belecon. Bedaŭrinde. Resume mi trovis Budapeŝton unu el kutimaj grandaj urboj en la mondo. Sed ĝi ekbrilas en la fono de esperanta historio, ĉar ĝi entenas kulturan perlon en la sino.



# Nia vojaĝo al Islando

**Doi Ĉieko kaj Hirokaz**

La 19an de julio ni (mi kaj mia edzo) flugis de la flughaveno de Narita al Rejkjaviko tra Kopenhago.



## survoje



En la flughaveno de Kopenhago ni renkontis esperantistojn el kelkaj landoj, ĉefe el Sudameriko.



Ni renkontiĝis kun multaj esperantistoj el diversaj landoj. Belga esperantisto Jo Haazen estas ludisto de Kariljono, tre granda muzikilo el sonoriloj. Li vizitis Jokohamon en 1984.




En la flughaveno de Rejkjaviko nin akceptis ne esperantistoj sed afiŝoj en Esperanto, pri busbileto al la urba centro. Sur la afiŝo vi povas trovi simbolan markon de la kongreso.

## kun geamikoj

Sara Su Jones el Usono, kiu ludis violonon en Koncerto en la UK. En 1979 kiam mia edzo oficvojaĝis al Ĉikago, Usono, li vizitis esperantiston Kent Jones. Estis Esperanta familio, kie estis filineto 4-jara Sara. Unu jaron antaŭe en 1978, kiam ŝi estis ankoraŭ 3-jara, ŝi ludis violonon en la UK en Varno, Bulgario. Ŝi deziris korespondi kun nia filino Amiko, siatempe 8-jara. Kaj do komenciĝis ilia korespondado en Esperanto. Bedaŭrinde tio daŭris nelonge. Sara diris, ke ŝi ankoraŭ nun konservas la korespondaĵon.




# amuzaĵoj

En duontaga ekskurso nomata "Fajra Ringo" ni vizitis la lokon nomata Þingvellir (ŝingvellir), kie kuniĝas la du kontinentoj eŭroazia kaj amerika. La divid-distanco de ambaŭ kontinentoj tie larĝiĝas 2 centimetrojn jare.



Per teatraĵo oni prezentas la historion de Islando.




Infanoj en Gronlando



En 1986 en la blanka domo renkontiĝis la usona prezidento Reagan kaj la sovetia prezidento Gorbachev. Per la renkontiĝo montriĝis signeto de la fino de la malvarma milito inter Oriento kaj Okcidento.

Ĉieko-Gorbachev kaj Hirokaz-Reagan interparolas pri gravaj aferoj.







Ni vizitis la oficejon de Islanda Esperanto-Asocio, proksime de nia hotelo.




Vidu la kostumojn de piedirantoj, kvankam estas meze de somero!

# La 7-a Azia Kongreso en Israelo
## kun pleno da ekskursoj


SIBAYAMA Zyun'iti
kaj Noriko



Ekskurso en Jersalemo, 22an de aprilo









La sanktaj vortoj en la japana kaj en Esperanto en preĝejo ➔





Tiu ĉi numero estas la unua provo kun koloraj fotoj, eĉ por paperaj legantoj, kvankam PDF-legantoj jam ĝuis kolorajn fotojn. En ĝi ni metis jaran raporton de nia rondo, kaj kontribuaĵojn por la tago de "prezento de someraj spertoj".